# Tamen Plu

**Oficiala organo de**
**Esperanto en Sudaŭstralio.**
**Legeblas ankaŭ interrete**
**http://home.iprimus.com.au/esperantobob/**

**Bonestu sendi ĉiun korespondaĵon al:**
**6 Dorset Street, Semaphore Park, S.A. 5019, aŭ al**
**esperantobob@iprimus.com.au**

**Bonestu ne forgesi de tempo al tempo atente rigardi tiun ate de Paŭlo konstante ĝisdatigatan ligilon al la 21a Somerkursaro de AEA:**
**www.thebegavalley.com/1468.0.html**

**Redaktanto: Bob Felby** — **Julio 2005**
**Telefono: (08) 8242 1460** — **Jarkolekto 24**

***Post la unua danco kun dolĉulino diras Rune:***
***”Mi invitis vin danci, ĉar vi aspektas tiom dolĉa”.***
***”Jes”, respondis la knabino, ”mi tre suferas pro mia aspekto!”***

## Edukado

**Se vi vere volas lerni kiel senerare uzi Esperanton, tiam trastudu pli ol nur unu fojon la verkon por la nova jarmilo: ”Lingvaj Resondoj”.**



**La ĉefverko de la fama Esperantologo kaj nemalhavebla instruisto, kiu ĉiam invitatas, kaj aktivas, en niaj Somerkursaroj kaj Kongresoj, Marcelo**

Leereveld, haveblas nun de la verkinto, 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur $22,00.

*Alvenas juna belulino al la hotelakceptejo:*
*”Ĉu mia edzo jam alvenis? Ni devas loĝi en ĉambro n-ro 84”.*
*”Nur mallongan momenteton, mi kontrolos. Kio estas via nomo?”*
*”Bergsten, Berggren aŭ io simila...!”*

## Gravaj Esperanto-eventoj:

La 90a  Universala Kongreso de Esperanto okazos de sabato la 23a ĝis sabato la 30a de julio 2005 en la belega urbo, Vilno, Litovujo.
De dimanĉo la 31a de julio ĝis dimanĉo la 7a de aŭgusto 2005 okazos la 61a Internacia Junularkongreso en Zakopane, Polujo.
Merkredon la 7an de septembro ni kunvenos en la Komunumejo en Clarence Park, 72-74 East Avenue, ĉe la angulo de Orienta Avenuo kaj Canterbury Teraso, Nigra Arbaro, 5035, tuj apud la fervoja stacidomo, Clarence Parko, kie vi ĉiuj estas bonvenaj.
Merkredon la 21an de septembro ni kunvenos en la Komunumejo en Clarence Park, kie vi ĉiuj estas bonvenaj.
Sabaton la 24an de septembro ni okazigos ekskurson al Haveno Viktoro. Detaloj sekvos!
Sabaton la 22an de oktobro ni renkontiĝos je la 12a horo en la Komunuma Ĝardeno en Wynn Vale.
Dimanĉon la 13an de novembro ni renkontiĝos ĉe Sandor kaj Helena por Amuzaĵoj kaj Ludoj.
La 7an de decembro ni festos la 146an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof en la bone, eĉ bonege konata komunumejo, en Clarence Park, la antaŭurbo kun multaj esperantistoj.
Ĝuu 13 tagojn da intensa studado de la internacia lingvo, Esperanto, dum la 21a Somerkursaro/kongreso de AEA. Travivu amikajn aktivecojn kaj Esperanto-kulturon

**plonĝante en la lingvon ekde la 15a □is la 28a de januaro 2006 en ”Kianinny Cabins”, Tathra Road, Tathra, NSK 2550, □e la sudorienta marbordo de Novsudkimrujo.**
**La 91a Universala Kongreso de Esperanto okazos de la 29a de julio □is la 5a de a□gusto 2006 en belega Florenco, Italujo.**

***”Bengtsson, kiel povas esti, ke mi jam tri fojojn hodiaŭ trovis vin dormanta anstataŭ laboranta”?***

***”Nu, la tialo verŝajne estas, ke vi aĉetis novajn ŝuojn kun kaŭĉukaj plandumoj!”***

## La unua vintrokursaro de E.E.S.A

**estis, kompreneble, eĉ tre sukseca, ĉar instruis Sandor, Trevor kaj Katja. Indrani gvidis la konversacian rondon.**

**La vintrolernejo konsistas el pluraj konstruaĵoj. Ni disponis pri du kuirejoj, manĝis kaj trinkis ĝis plena kontentiĝo. La manĝaĵo bongustis kaj abundis. Verŝajne ĉar ni mem kunportis ĝin!**

**La distrado estis bonega, ŝajnas ke ankaŭ en Sudaŭstralio troviĝas talentuloj!**

**Vi ĉiuj scias ke mi ekde mia alveno al Aŭstralio petegis la estraron de AEA nuligi la somerkursarojn kaj anstataŭigi ilin per vintrokursaroj. Nun mi ne plu estas tiom certa, ĉar fakte estis iom tro malvarme por mi, skandinavo, kiu ne ŝatas la malvarmon. Almenaŭ du el la ĉambregoj je nia dispono estis varmigeblaj, sed tamen, kaj tiel plu. Ĉu ne? Eble la somerkursaroj devus okazi en la printempo kaj vintrokursaroj en la aŭtuno. Tio estas io pripensinda!!!**

***Estis en la praarbaro du ĉasistoj. Subite ili ekvidas grandan leonegon starantan en senarbejo. Unu ĉasisto forkuris en la praarbaron, dum la alia genufleksis, petegante Dion ke la leonego ne malsatas. Levante sian kapon li vidis, ke ankaŭ la leonego sidas kaj preĝas.***

***Diris la ĉasisto: ”Ĉu ankaŭ vi preĝas al Dio?”***

***La leonego: ”Ne, mi nur diras mian manĝopreĝon!”***

## Nova renkontiĝejo de E.E.S.A.

**Danke al iuj el niaj senlacaj kaj energiegaj membroj ni preskaŭ tuj trovis novan loĝejon, sed sciu, ke ni pro la forestado de la plej multaj el niaj membroj iomete ferios ĝis septembro. Ili ĉiuj, feliĉuloj, iros kongresi en la belega urbo, Vilno, en Litovujo. Sukceson al ili kaj la kongreso!!!**

**Sed ekde la 7a de septembro ni regule renkontiĝos en Clarence Park, en la komunumejo tiom bone konata al la plej multaj esperantistoj post la sukcesplena unua vintrokursaro de "Esperanto en Sudaŭstralio. Ni renkontiĝos tie la unuan kaj trian merkredon de ĉiu monato de la jaro.**

**La renkontiĝejo estas same bona kaj komforta kiel tiu en Tynte Street. Ĝi situas sur la teretaĝo. Kunvenos tie nur ni, kaj ni povos kriegi kiom eble plej laŭte, se tio necesos.**

**Troviĝas tuj apud la komunumejo eĉ bonega fervoja stacidomo, kaj sendube estas apudaj ankaŭ kelkaj busoj.**

**Ni renkontiĝos tie ekde la unua merkredo de septembro. Tiam la tutan ceteron de 2005 ni okazigos ĉiujn niajn kunvenojn tie. La Zamenhofan Vesperon ni okazigos merkredon la 7an de decembro en la tiea renkontiĝejo. Estas tie, kiel vi scias, bonega kuirejo!!!**

**Sciu, ke vi ĉiuj estos tre bonvenaj tie.**

***La nova oficiro en la sveda armeo tre ĝojiĝis inspektante siajn subulojn. Tiujn en la kuirejo li demandis: "Kion vi faras por purigi la trinkakvon?"***

***"Ni boligas ĝin!"***

***"Bone, eĉ bonege!"***

***"Poste ni filtros ĝin!"***

***"Eĉ pli bonege!"***

***"Kaj por esti tute sekuraj ni trinkas nur bieron..."***

## Semajnfine en Pola Radio

**Vendrede, la 17an de junio 2005 ni interparolis kun nia franca poldevena aŭskultanto, Tadeo Nowak, kiu**

**rakontis i.a. kiel Esperanto proksimigis al li la hejmlandon de liaj gepatroj. Sabate la gastoj de la sonmagazino ”Esperanto Ekspreso”, Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia, reference al la pasintjara jubileo parolis pri la misio de tiu grava ekukcentro. Dimanĉe la 19an de majo aŭdiĝis nia kutima ”Leterkesto” kun reagoj de korespondaĵoj el la geaŭskultantoj. Vizitu nin: www.radio.com.pl Skribu al ni: esperanto.redakcio@radio.com.pl**

***”Kiel vi povas vendi viajn varojn tiom malmultekoste?”***

***”Tre facile, ni maldungis la plej multajn el niaj laboristoj!”***

## Malaperis Gerda

**Joe Bazilio Costa, brazilano loĝanta en Formiga, provinco Minas Ĵerajs faras filmon pri la vaste konata libro de Claude Piron, ”Gerda malaperis”.**

**Nun plaĉus al Joe, la brazilano, ricevi amason da gratulleteroj de preskaŭ ĉiuj esperantistoj en la tuta mondo. Tiujn leterojn li montros al komercistoj en Formiga, esperante ke tiuj pretos pagi almenaŭ la kostojn de parto de la filmo.**

**Kiam vi skribos bonestu citi vian nomon, tiun de via urbo kiel ankaŭ tiun de la klubo, en kiu vi membras, ne forgesante kelkajn vortojn pri la graveco por la esperantistaro de la projekto.**

**Eble ankaŭ vi interesiĝas pri la projekto kaj ŝatus kunlabori. Vi ne bezonas donaci monon, sed viaj bonaj ideoj estas bonvenaj. Joe Bazilio Costa, Rua Gal. Carneiro, 246-A, 35570-000-Formiga-MG, Brazilo amiko@uai..com.br**

## *La elflarema hundo*

***En flugmaŝino viro ĵus sidigis sin apud la fenestro kiam alia viro sin sidigis sur la sidejo apud la trairejo. Lia nigra labradorhundo sin sidigis sur la meza sidloko tuj apud tiu, kiu sidis apud la fenestro.***

***Demandas la unua viro, ”kiel povas esti ke oni permesas al vi kunpreni vian hundon en la flugmaŝinon?”***

***Respondas la alia viro, ”tio estas ĉar mi estas doganistestro, la hundo estas elflaranta hundo. Ĝi nomatas Sniffer, li estas la plej bona el tiaj hundoj. Tuj kiam ni ekflugos mi montros al vi kiom bonege li laboras.”***

***Ekflugas la flugmaŝino, diras la doganistestro, ”rigardu ĉi tion!”***

***Li diras al Sniffer, ”ek al la laboro!”***

***Malsupren saltas Sniffer, laŭiras la trairejon, fine sin sidigas kelkajn sekundojn apud virino. Tiam Sniffer reiras al sia sidloko kaj metas unu piedon sur la brakon de la doganistestro. Diras la doganistestro, ”Bona, eĉ bonega knabo”. Diras li al la unua viro, ”tiu virino surhavas sur si mariĥuanon, mi notas la numeron de ŝia sidloko, la aŭtoritatuloj arestos ŝin post kiam ni surteriĝos.”***

***”Ho, bone, eĉ bonege”, diras la unua viro.***

***Refoje, la doganistestro igas Sniffer elflari laŭ la trairejo. Sniffer flaras kaj flaregas, sin sidigas apud viro kelkajn sekundojn, tiam ĝi reiras al sia sidloko kaj metas du piedojn sur la brakon de la doganistestro. Diras la doganistestro, ”tiu viro surhavas sur si kokainon, mi notas la numeron de lia sidloko kaj la polico arestos lin post kiam ni surteriĝos.”***

***”Tio tre plaĉas al mi!” diras la unua viro.***

***Refoje Sniffer devas labori. Sniffer laŭiras la trairejon kelkajn fojojn, sidigas sin momenteton, tiam ĝi rapidegas al la doganistestro, ensaltas en la mezan sidlokon kaj komencas malplenigi, eĉ malplenegigi sian stomakon sur la sidlokon.***

***”Kion en la mondo signifas ĉi tio?” demandas la unua viro, ”kion li ĉifoje eltrovis?”***

***Nerve respondas la doganistestro, ”Sniffer ĵus trovis bombon!”***

## Nun 21 oficialaj lingvoj en Eŭropa Unio

**Aliĝis ankoraŭ unu lingvo al la jam tro abunda amaso da lingvoj en Eŭropa Unio. Nun ankaŭ la irlanda estas oficiala laborlingvo. La decido estis anoncita lunde la 13an de junio en Luksemburgujo, kie renkontiĝis la eksterlandaj ministroj de EU. ”EU dungos novajn tradukistojn kaj**

**interpretistojn, kaj la postenoj estos malfermitaj por parolantoj de la irlanda", ĝojas Dáithi Mac Cárthaigh, la estro de la instituto pri la irlanda lingvo, Conradh na Gaeilge. Legu pli en Libera Folio! http://www.liberafolio.org**

*"Ĉu ne estis al vi embarase, kiam vi erare eniris la banejon por virinoj?"*

*"Ne, ne, ne, mi simple diris: "pardonu min sinjoroj, ĉu iu el vi vidis miajn okulvitrojn?"*

## Nur unu plia delegito en 2005

**La ĵus aperinta jarlibro de UEA por la jaro 2005 enhavas la nomojn de 1.784 delegitoj en 92 landoj. Tiu de 2004 registris nur 1.783 delegitojn, do la delegita reto kreskis je unu tuta delegito. En novembro 2004 la ĉefdelegitoj de UEA ricevis instigon varbi novajn delegitojn, por ke la Delegita Reto refoje kresku, sed oni atingis nur simbolan kreskon. Legu pli en Libera Folio! http://www.liberafolio.org**

## *Aŭdite sur la dancplanko*

*"Pardonu min, ĉu mi rajtas havi la venontan dancon?"*
*"Eĉ tre volonte, ĉar mi ne deziras ĝin!"*

## La elekta komisiono proponas sin mem

**La elekta komisiono de Universala Esperanto-Asocio havas gravan rolon en la formado de la gvidaj organoj de la asocio. Por la nova elekta komisiono estas proponataj kvar anoj: István Ertl, Janez Jug, Lee Chong-Yeong kaj Edvige Tantin Ackermann.**

**"Ŝajnas neserioze ke s-ino Tantin Ackermann, kiu konscie provis limigi kandidatiĝojn, refoje estu membro de la Elekta Komisiono", komentas Yves Bellefeuille. Legu pli en Libera Folio! http://www.liberafolio.org**

*"Ĉu vi loĝas ĉi tie vian tutan vivon?"*
*"Ne, ankoraŭ ne!"*

## Nova dissendolisto pri la temo ”feminismo”

**Por informiĝi pri la nova listo ”feminismo”, vi vizitu: http://groups.yahoo.com/group’feminismo. Se vi deziras, aliĝu per: feminismo-subscribe@yahoogroups.com. Mesaĝon sendu nur poste al: feminismo@yahoogroups.com. Bonestu plusendi la informon al interesiĝantoj kaj organizaĵoj. Kore salutas la administrantino, Dorothea Kaiser! donjo@link-abg.de**

## *Grava vizitanto*

***”La cikonio alportis al vi malgrandan frateton, Ole. Ĉu vi deziras vidi lin?”***

***”Ne, mi preferas vidi la cikonion!”***

## Bona helpilo

**En www.lerni.info troviĝas nun pli bona kaj simpla versio de memorhelpilo por lerni vortojn. Ĝi taŭgas precipe bone por Esperanto! Ĝi troviĝas en tri lingvoj” Esperanto, angla kaj germana.**

## *Logiko*

***Maljuna Johano estas en la ĉefurbo la unuan fojon. Li intencas viziti amikon. Li demandas al policisto, ”per kiu buso mi devas kuniri?”***

***”Vi kuniru per buso n-ro 20!” diras la policisto.***

***Kelkajn horojn poste la policisto preteriras. Li vidas, ke maljuna Johano ankoraŭ staras tie atendante.***

***”Ĉu vi ankoraŭ ne forveturis?” li demandas.***

***”Ne, ankoraŭ ne, sed tre baldaŭ, ĉar jam venis 19 busoj!”***

***La edzino al sia edzo:***

***”Ĉu vi amos min ankaŭ kiam mi estos grizhara?”***

***La edzo al sia edzino:***

***”Jes, kial ne? mi amis vin kiam vi estis ruĝhara, nigrahara kaj blonda!”***